

Ignat Herrmann:

LA PENTRISTO KAJ LA FIAKRISTO/.

/Sceno el la juĝejo. /

*

La pentristo kaj la fiakristo.

Sceno el la juĝejo.

Personoj:

Juĝisto,
protokolisto,
sinjoro Slabihoudek,
sinjoro Kalivoda,
advokato.

/Juĝeja ĉambro. Se la tablo sidas juĝisto. La protokolisto staras ĉe la pordo koridora./

protokolisto: /vokas/ Sinjoro Slabihoudek! Sinjoro Kalivoda!
/En la ĉambron eniras du personoj. La unua estas fortika kun estiminda ventreto, kun larĝaj, rondaj vangoj ruĝaj kun okuloj palpebrumantaj kaj en la mondon gaje ridetantaj. /Slabihoudek/. La dua persono estas osta kaj alta en kvadratita pantalone, velura jako, kun artista ĉapelo sur la kapo, kun longaj, grizaj haroj sub ĝi. Alta frunto, densaj kaj grizetaj brovoj, grizetaj lipharoj kaj grizeta kapra barbo. Vangoj malgrasaj, konkavaj, rigargo deziranta esti serioza, sed estanta ĉagrena, larĝa surĉemiza kolumo, sub la kolumo larĝa kravato kun longaj, flirtantaj flankajoj. /Kalivoda/. Post la malgranda, fortika persono eniras en la ĉambron ankoraŭ unu malgranda persono, malpli fortika, kun ruĝaj haroj kaj barbo, ruĝaj vangoj, vivecaj sed bonanimaj okuloj. /Advokato/. La protokolisto sidigas sin je la maldekstra flanko de la juĝisto./

Juĝisto: Ĉu vi estas? Sinjoro Slabihoudek?

Slabihoudek: Jes.

Juĝ. Sinjoro Kalivoda?

Kalivoda: Tie ĉi.

Juĝ. Se vi estas tie ĉi, deprenu la ĉapelon. En oficeja ĉambro oni ne surhavas ĉapelon., /Kalivoda embarasita deprenas sian artistan ĉapelegon, Slabihoudek, kiu deprenis sian ĉapelon jam sur la koridoro, ridetas. La protokolisto palpebrumis al la kontraŭuloj kaj ridetas, ĉar li antaŭsentas gajan proceson./

Juĝ. Ĉu havas iu el vi advokaton? Aŭ ĉu vi estas solaj?

Slabih. Mi petas, via Moŝto, mi havas advokaton.

Advokato: /riverencas profunde antaŭ la juĝisto kaj je lia signo li sidigas sin ĉe la tablo je lia dekstra flanko./
Jes, mi estas la advokato, kiu venis por defendi interesojn de mia kliento.

Juĝ. Sinjoro Kalivoda: vi estas akuzata jen de sinjoro Slabihoudek, ke vi tre malhonorige insultis lin. Diru, ĉu vi ne dezirus peti lian pardonon, por ke ni povu pace ordigi la aferon? Vi ja ambaŭ loĝas en la sama domo, konstante vidante unu la alian, ne lasu veni la proceson ĝis verdikto.

Kalivoda: /profunde elspirante/ Via juĝista Moŝto! Oni ne povas min kondamni, ĉar mi estas senkulpa kiel porcelano. Li agas maljuste; kial mi do petu lian pardonon?

Juĝ.: Sinjoro Slabihoudek, ĉu vi ne volas pardoni al li?

Slabih.: /Rapide kaj raŭkvoĉe kun konstanta rideto/: Via juĝista Moŝto, alta tribunalo! Ĝis sia fino iru la proceso, se li estas tiel fiera kaj ne volas peti mian pardonon. Mi valorus eĉ ne unu heleron, se mi tiel lasus insulti min kaj la leĝo havu liberan vojon. Mi venigis advokaton, kiu do pagos lin?

Advokato: Bone dirite. Estas malbele, se vi ne volas paciĝi, vi ja estas najbaroj en la domo.

Slabih.: /rapide/: Mi petas, via Moŝto, mi estas luanto, li estas dommastro,

Kaliv.: /Ĵetas furiozan rigardon al Slabihoudek/.

Juĝ.: Kiel vi nomas?

Kaliv.: Ernesto Kalivoda.

Slabih.: /moke/: Ernesto. Sed baptita li estas je la nomo Mateo!

Juĝ.: Ne interrompu la parolon! Ankaŭ via vico venos!
/Al Kalivoda/: Kio estas kun la Mateo?

Kaliv. /serioze/: Mi petas, tio estas eraro. Mia patrino deziris, ke mi estu baptata je la nomo Ernesto, sed mia mortinta patro eraris ĝuste en tiu momento, kiam la pastro demandis la nomon kaj li diris la sian; tiel mi estis baptata Mateo, sed mia nomo estas Ernesto.

Juĝ.: /Al la protokolisto/: Skribu: Mateo Ernesto Kalivoda. Kiel aĝa vi estas?

Kaliv.: Kvindek-du-jara.

Juĝ.: Ĉu edziĝinta? Ĉu vi havas infanojn?

Kaliv.: /ĝemante/: Edziĝinta, mi petas kaj ses infanojn aldone.

Juĝ.: Kio estas via metio?

Kaliv.: /faras paŝon antaŭen/: Pentristo, honorinda tribunalo, pentristo.

Slabih.: /atendis tiun ĉi respondon kaj batalas malfacilan batalon. Liaj vangoj ruĝiĝas, la sublipa barbeto stariĝas kiel ĉe erinaco. Fine li elpuŝas, tuj post la respondo de Kalivoda/
/: Pentristo! Dommastro li estas, via Moŝto, honorinda tribunalo, dommastro!

Juĝ.: Ne interrompu la parolon, alimaniere mi elkondukigos vin! /Al Kalivoda/: Kiel ĝi estas, sinjoro Kalivoda, ĉu vi estas akademia pentristo, aŭ pentristo de porcelano, aŭ de ĉambroj?

Kaliv.: /kies lipoj nerve tremas/: Honorinda tribunalo, mi estas origine fakte pentristo akademia. Sed pro diversaj malicoj de la sorto mi devis forlasi la altan lernejon kaj poste mi pli praktikis la ornaman arton, ĝenerale pentradon dekoran. Mi ornamas loĝejojn...

Juĝ.: Mallonge, vi estas pentristo de ĉambroj?

Kaliv.: Se oni ĝin tiel prenas, jes, honorinda tribunalo, sed stila, pure stila; mi pentras nur ..laŭstile..../profunde ekĝemas/.

Juĝ.: Nu bone. Aŭdu la akuzon. Sinjoro Slabihoudek vin akuzas, ke vi la unuan de septembro malinde insultis lin. Vi elkuris sur la korton kaj kriis laŭdire, ke Slabihoudek estas furioza ĉevalulo, frostiĝinta ĉevalaĉo, malbona viraĉo, ĉevala orelo kaj intesto, ke lia loko estas en ĉevalejo inter ĉevaloj, sed ne inter homoj. Kion vi respondas al tio ĉi? Ĉu estas tiel? Ĉu vi diris ĉi tion? Kial vi uzas tiajn insultaĵojn?

Kaliv.: Honorinda tribunalo, tio ne estis insultaĵoj, tio estis ekscitiĝo. La viro, jen li, li estos mia tombo kaj senpatrigos miajn ses infanojn.

Juĝ.: Ĉu vi diris tion aŭ ne? Respondu!

Kaliv.: /premite/: Ĉio estis alie, honorinda tribunalo. Ĉio estas elpenŝaĵo kaj instigaĵo - li ĝismorte turmentos min!

Juĝ.: Kia elpenŝaĵo kaj instigaĵo! La akuzanto havas por tio ses atestantojn, luantoj el la domo. Kaj kial vi tiel insultas la luantojn, estante dommastro?

Kalivoda: /ploreme/: Honorinda tribunalo, permesu al mi paroli, mi ĉion klarigos.

Juĝ.: Lasu longan klarigadon kaj diru, ĉu vi tiel insultis aŭ ne.

Kaliv.: /frotas siajn manojn en senlima ekscitiĝo, sindone/: Se mi eĉ tie ĉi ne povas paroli, ĉio estas perdita.

Juĝ.: /Kompateme/: Nu bone, kion do vi volas diri al ni? Parolu, klarigu al ni...

Kaliv.: /profunde spirante/: Honorinda tribunalo! Sinjoro advokato! Sinjoro protokolisto! Paco ĉiela regus en nia domo, se sinjoro Slabihoudek ne loĝus en ĝi. /Slabihoudek moke ridetas/. La sorto persekutas min de mia infanaĝo, sed nun, estante viro maljuna, ĝi estas neeltenebla. Ni vivus en paco, se li respektus mian arton. Li mem koleras, se iu titolas lin droŝkisto, ĉar li estas fiakristo, sed min li turmentas konstante kaj senripoze. Ne mia kulpo estas, ke mi estas devigata esti dommastro, sed tamen mi ne estas iu ajn /ordinara dommastro. Mi kolektas nur la lupagon de la luantoj; tio estas ĉio. Ĉiun ceteran laboron faras mia edzino. Ŝi balaas la korton kaj la koridorojn, lavas la ŝtuparon, purigas la trotuaron antaŭ la domo kaj nokte ŝi malfermas la pordon al la luantoj. Sed mi preskaŭ la tutan tagon ne estas hejme kaj pentras; mi pentras nur ĉe noblaj kaj estimataj gesinjoroj.

Juĝ.: Nu bone, sed tio ne apartenas tien ĉi, ĝi jam daŭras iom tro longe.

Kaliv.: Tuj, mi petas, nun ĝi venos. Mi ne plenumas do iajn dommastrajn laborojn, sed tamen sinjoro Slabihoudek ĉiam, kiam li renkontas min, vokas: Vi, dommastro, tie suu la korto estas denove ia malpuraĵo. Dommastraĉo, atentu do viajn devojn, la kanalo estas ŝtopita. Rigardu, rigardu, ĉi tie fluas akvo de la tegmento...kaj tiel mi povus daŭrigi senfine, honorinda tribunalo. Senĉese li frapas miajn orelojn, per tiu "dommastro" kaj "dommastraĉo", kvankam li bone scias, ke mi estas pentristo. Mi tute ne postulas de li ian specialan honoron, li ne alparolu min, li traktu ĉion kun mia edzino. Kaj se li volas paroli kun mi, li alparolu min simple: Kalivoda. /rapide, peteme/: Ho, se la honorinda tribunalo bonvolus malpermesi al li, titoli min dommastro ... mi pardonpetus lin hodiaŭ kaj ĉio estus bona...

Juĝ.: La tribunalo ne povas ordoni al li, kiel li alparolu vin, tio dependas de lia bonvolo.

Slabih.: /moke grimacas rigardante sian ventron/.

Kaliv.: /ĝemante/: De lia bonvolo. Do mi estas perdita.

Juĝ.: Sed ĝis nun vi ankoraŭ ne estas dirinta al ni, ĉu estas vero aŭ ne, kion asertas la akuzo.

Kaliv.: Honorinda tribunalo, ĉio estas alie. Mi sendis mian lernobubon, Jozefon, ke li elverŝu iom da verda farbo, kiu jam ne estis uzebla. Joĉjo iris kaj elverŝante ĝin en la kanalon iom surŝprucis sur la droŝkon de sinjoro Slabihoudek. Li elkuris el la ĉevalejo, kie li furaĝis, kaj ekinsultis min. Terura estis, kion li ĉion diris al mi. Pentraĉisto, malodoranta metiistaĉo, ĥolero de la loĝejoj; ĉio ĉi tio koncernis ankaŭ miajn laboristojn. Sed min li krom tio insultis porkaĉo kaj ke mi, kiel dommastro, devas zorgi pri pureco en la domo. Je tio mi paceme respondis...paceme, honorinda tribunalo kaj tute sen kolero: Sinjoro Slabihoudek, hontu, vian aĉan edukon oni eĉ kun tiu de viaj ĉevaloj kompari ne povas... ili almenaŭ nur manĝegas kaj ne parolas, sed vi malfermegas ĉi tie vian buŝon kiel, nu- kiel droŝkisto. Tion mi diris kaj nenion pli.

Slabih.: /tremanta pro kolero kaj ludanta kun ĉiuj fingroj/: Ho, ke la fulmo kaj tondro...

Juĝ.: Silentu - kia ekpenso, blasfemi tie ĉi.

Slabih.: Ho, ke la fulmo kaj tondro - via Moŝto, honorinda tribunalo, mi kreviĝos, mi kreviĝos, tia buŝego. Ĉi tie li ludas la rolon de senkulpulo kaj tiam li insultis min, ke la hundoj bojis je mi. Li diris: iom ŝprucis. Li ja farbomakulis al mi, la bubo senhonta, la tutan postan parton de mia veturilo -- sed li estis instigita de ĉi tiu dommastro. /Slabhoudek faras ekmovon./ Ĉu li insultis min? Jes kaj kiel li insultis min! Li diris ankaŭ, ke el ĉiuj flankoj montriĝas ĉe mi la ĉevalaĵo--sed tion la advokato ne donis en la akuzon; li diris, sufiĉas la ceteraj insultaĵoj. Sinjoro advokato, diru do ankaŭ ion.

Juĝ.: Ne estas bela, se vi ne volas paciĝi. Vi ja loĝas en la sama domo, vidas konstante unu la alian, ne lasu veni la proceson ĝis verdikto.

Slabih. Mi ja havas la plenan domon da atestantoj kaj se mi eĉ devus manĝegi kun miaj ĉevaloj tranĉitan pajlon, mi ne cedos.

Juĝ.: Sinjoro Slabihoudek, tamen vi devus paciĝi. Ĉi tie kuŝas ankaŭ akuzo kontraŭ vi. Akuzo de sinjoro Kalivoda, ke vi la saman tagon vespere en la gastejo Ŝtupart insultis lin antaŭ multaj atestantoj, ke vi nomis lin bubo pendiginda kaj pentraĉisto, ke vi plue diris, ke lia loko estas en malliberejo aŭ frenezulejo kaj ke li estas tamen nur dommastra bruto. Kion vi povas respondi?

Slabih.: Mi petas, via Moŝto, honorinda tribunalo, tiam mi trinkis bieron kaj ni nur tiel interbabilis.

Juĝ.: Bela interbabilado. Sinjoro Kalivoda povas tion atesti per sep atestantoj, ke vi ekinsultis jam ĉe la dua glaso, daŭrigante la insultadon duonan horon. Certe vi scias, kion la atestantoj povas pruvi al vi - nu donu al sinjoro Kalivoda la manon, li pardonos al vi, vi retiros vian akuzon kaj ĉio estos bona.

Slabih.: /aliras hezite al sia advokato kaj parolas mallaŭte kun li. Poste li turniĝas al la juĝisto, humile/: Mi do repaciĝus, via Moŝto.

Juĝ.: Nu jen, sinjoro Kalivoda, ĉu vi pardonos al li?

Kaliv.: Se li tie ĉi promesas, honorinda tribunalo, ke li ne plu humiligos min, mi pardonas al li.

Juĝ.: Do, sinjoro Slabihoudek, estu prudenta, sed ankaŭ vi, sinjoro Kalivoda. Vi ne incitu lin por la vorto "dommastro" kaj vi ne makuligu per farboj lian droŝkon.

Slabih.: Fiakron! via Moŝto, fiakron!

Juĝ.: Bone, do fiakron. Donu al vi la manojn. Jes, tiel kaj la afero estas finita. La akuzoj falis. Iru hejmen. /La viroj donas al si la manojn kaj foriras/

Slabih.: /Al Kalivoda en la pordo/: Sed sciu, Kalivoda, ĝi bone finiĝis por vi, ĉar ankaŭ mi insultis vin. Sed tamen mi estas la fiakristo Slabihoudek kaj vi, vi restos por mi ĉiam la dommastro, ĉu vi komprenas?

Kaliv.: /kunpremas la lipojn kaj palega eliras el la pordo/.

KURTENO

Tradukis Th.Kilan.
Třebíč, 2.2.1933.

*Strojopis nalezen v roce 2015 v Kilianově domě v Třebíči
Vysíláno 1.IV.1933 Verda Stacio*